

46 ORDINARA MURDO

„Ofte mi pripensis," diris poste sinjoro Hanák, „kial maljustaĵo ŝajnas al ni pli malbona, ol kia ajn alia malbono, kiu povas nin trafi. Ekzemple, se ni vidus, ke unusola homo estis senkulpe kondamnita al karcero, tio maltrankviligas kaj ĉagrenas nin pli, ol se miloj da homoj vivas en mizero kaj doloro. Mi vidis tian mizeron, ke ĉia karcero kompare al ĝi estas vera bonstato; kaj tamen la plej granda mizero ne ofendas nin tiom, kiom maljustaĵo. Mi dirus, ke en ni estas ia instinkto por la justeco; kaj kulpo kaj senkulpo, juro kaj justo estas same elementaj, teruraj kaj profundaj sentoj kiel la amo kaj malsato.

Ni konsideru la jenan kazon: Mi pasigis kvar jarojn en la milito, kiel pluraj el vi; ni ne rakontos al ni, kion ni tie vidis, sed vi atestos al mi, ke tie oni al kutimiĝis je multo: ekzemple je kadavroj. Mi vidis centojn kaj centojn da mortaj junaj homoj; kaj iam terure abomene mortaj, tion kredu al mi; kaj mi konfesas, ke mi estis jam tute indiferenta pri ili, kvazaŭ ili estus malnovaj ĉifonoj, nur se ili ne fetoris. Nur mi diradis al mi, homo, se vi eskapos el ĉi tiu bruta tumulto vivanta kaj sendifekta, do nenio plu en la mondo vin senekvilibrigos.

Proksimume duonjaron post la milito mi estis en mia hejmo, en Slatina; foje matene iu frapas mian fenestron kaj vokas, sinjoro Hanák, venu rigardi, sinjorino Turková estas murdita! Sinjorino Turková posedis nome etbutikon kun papero kaj mercero; neniue iam atentis ŝin, nur de temp' al tempo venis iu en ŝian butiketon por aĉeti fadenbobenon aŭ kristnaskan bildkarton. El la butiko oni atingis tra vitra pordo etan kuirejon, kie ŝi dormadis; sur la pordo pendis kurtenetoj, kaj kiam en la butiko ektintis sonorileto, ekrigardis sinjorino Turková tra la kurtenetoj por vidi, kiu venis, viŝis la manojn per antaŭtuko kaj ŝovis sin en la butikon. Kion vi dezirus? ŝi diris malkonfide; oni sentis sin nur kiel entrudiĝinto kaj klopodis kiel eble plej rapide malaperi.

46 OBYČEJNÁ VRAŽDA

„Často jsem přemýšlel," řekl na to pan Hanák, „proč se nám zdá být křivda něčím horším než já nevím co zlého, co může člověka potkat. Tak příkladně kdybychom viděli, že jediný člověk byl nevinně odsouzen do vězení, znepokojí a trápí nás to víc, než když tisíce lidí žije v bídě a bolesti. Já viděl takovou bídu, že každý kriminál je proti ní zrovna blahobyť; a přece nás ta nejhorší bída tak neurazí jako křivda. Já bych řekl, že v nás je nějaký justiční instinkt; a že vina a nevína, právo a spravedlnost jsou stejně prvotní, strašné a hluboké city jako láska a hlad.

Vemte si tenhle případ: Já byl čtyři léta ve válce jako leckdo z vás; my si nebudeme říkat, co jsme tam viděli, ale to mně dosvědčíte, že si tam našinec zvykl na ledacos: například na mrtvé. Já viděl sta a sta mrtvých mladých lidí, a někdy moc šeredně mrtvých, to mně můžete věřit; a já se vám přiznám, že už mně to bylo tak jedno, jako by to byly staré hadry, jen když nesmrděli. Jenom jsem si říkal, člověče, vyjdeš-li z té hovadské mely živý a celý, tak už tě nic v životě nerozhází.

Asi půl roku po válce jsem byl doma ve Slatině; jednou ráno mně někdo tluče na okno a volá, pane Hanák, pojd'te se podívat, paní Turková je zabitá! Paní Turková totiž měla takový maličký obchod s papírem a nitěmi; nikdo se o ni jakživ nestaral, jen sem tam někdo přišel do toho jejího krámku pro špulku nití nebo vánoční pohlednici. Z krámu vedly skleněné dveře do takové kuchyňky, kde spala; na těch dveřích visely záclonky, a když v krámě cinkl zvonek, podívala se paní Turková těmi záclonkami z kuchyně, kdo to přišel, utřela si ruce zástěrou a vsunula se do krámu. Co byste rád? řekla nedůvěřivě; člověk měl pocit, že se do toho krámu jen vetřel a hleděl být co možná brzo zas venku.

Ĝi aspektis kiel se vi levetas ŝtonojn, kaj tie en la humida kavaĵo krablas soleca kaj timigita skarabo; do la ŝtonon vi remetas ĝialoken, por ke la neagrabla skarabo trankviliĝu.

Aŭdinte la novaĵon, mi kuris rigardi, mi opinias pro nura triviala scivolemo. Antaŭ la butiketo de sinjorino Turková svarmis homoj kiel abeloj ĉe enflugejo; sed la loka policisto enlasis min, ĉar li ŝatis min kiel kleran homon. La sonorileto ektintis en la silenton kiel kiam ajn, sed min la klara kaj fervora ektinto en tiu momento froste tremigis; mi sentis, ke ĝi ne konvenas ĉi tie.

Sur sojlo de la kuirejo kuŝis sinjorino Turková vizaĝaltere, sub ŝia kapo preskaŭ nigra sangmarĉeto; sur la nuko la blanka hararo estis kungluita sange kaj nigrete. Kaj tiufoje subite mi eksentis, kion mi en la milito ne ekkonis: hororon pro morta homo.

Estas strange, la militon preskaŭ mi forgesis; ankaŭ la homaro iom post iom ĝin forgesas, kaj eble tial denove devos esti nova milito. Sed la murditan maljunulinon, kiu entute por nenio taŭgis, tiun malgrandan butikistinon, kiu eĉ ne bildkarton sciis ĝuste vendi, tiun neniam mi forgesos.

Murdita homo estas io alia ol morta homo; ĉirkaŭas lin ia terura sekreto. Kredu, mi ne povis kompreni, kial estis murdita ĝuste sinjorino Turková, tia ordinara kaj griza persono, kiun neniam iu atentis; kiel estas eble, ke ĉi tie tiel patose ŝi kuŝas kaj ke super ŝi kliniĝas ĝendarmo kaj ke ekstere sin prempuŝas tiom da homoj, por ekvidi almenaŭ parteton de sinjorino Turková. Por tiel diri, la povra virino neniam ĝuis tian grandegan atenton kiel nun, kiam ŝi kuŝis vizaĝe en la nigra sango.

Ŝajnis, kvazaŭ ŝi akirus strangan kaj teruran signifon. Neniam mi rimarkis, kiel ŝi estas vestita kaj kiel ŝi fakte aspektas; sed nun estis, kvazaŭ mi rigardus ŝin tra lenso ege kaj monstre grandiganta. Sur unu piedo ŝi havis babuŝon;

Ono to bylo, jako když nadzvednete kámen, a teď tam v té vlhké jamce pobíhá osamělý a poplašený brouk; tak ten kámen zas přiklopíte, aby se ten protivný brouk uklidnil.

Když tedy jsem slyšel tu novinu, běžel jsem se podívat, myslím, z docela sprosté zvědavosti. Před krámkem paní Turkové bylo lidí jako včel u česna; ale mne místní strážník pustil dovnitř, protože si mě vážil jako vzdělaného člověka. Zvonek cinknul do ticha jako kdykoliv jindy, ale mne v tu chvíli to jasné a horlivé zazvonění až zamrazilo; napadlo mě, že se to sem nehodí.

Na prahu do kuchyňky ležela paní Turková tváří k zemi, pod hlavou skoro černou kaluž krve; na týle bílé vlasy byly krvavě a do černa slepeny. A v tu chvíli jsem najednou pocítil, co jsem na vojně nepoznal: hrůzu nad mrtvým člověkem.

Je to divné, na válku jsem už skoro zapomněl; i lidstvo na ni pomalu zapomíná, a snad proto zas bude muset jednou být nová válka. Ale na tu zavražděnou stařenu, která tu celkem k ničemu nebyla, na tu malou kramářku, která nedovedla ani pohlednici pořádně prodat, na tu nezapomenu nikdy.

Zavražděný člověk je něco jiného než mrtvý člověk; je na něm takové strašlivé tajemství. Já vám nemohl pochopit, proč byla zavražděna zrovna paní Turková, taková obyčejná a šedivá osoba, o kterou se nikdo nikdy nestaral; jak to přijde, že tady tak pateticky leží a že se nad ní sklání četník a že venku se tlačí tolik lidí, aby zahlédli aspoň kousek paní Turkové. Abych tak řekl, ta chudák ženská se nikdy netěšila tak ohromné pozornosti jako teď, když tu ležela tváří v černé krvi.

Bylo to, jako by najednou nabyla podivného a děsného významu. Jakživ jsem si nevšiml, jak je oblečena a jak vlastně vypadá; ale teď to bylo, jako bych se na ni díval sklem nesmírně a obludně zvětšujícím. Na jedné noze měla papuči;

la dua babuŝo estis deŝovita kaj estis videbla ŝtrumpo surkalkane flikita - mi vidas ĉiun steberon, kaj ĝi ŝajnis al mi terura, kvazaŭ eĉ la mizera ŝtrumpo estus murdita. Unu mano spasme eniĝis en la plankon; ĝi aspektis tiel seke kaj senpove kiel birda piedeto; sed la plej terura estis la eta griza harligaĵo sur la nuko de la murditino, ĉar ĝi estis tiel zorgeme plektita kaj inter la strioj de sango-koagulaĵo ĝi briletis kiel malnova stano. Mia impresio estis, ke neniam antaŭe mi vidis ion pli korŝiran ol ĉi tiun makulitan virinan harligeton. Unu sangostrio sekiĝis post la orelo; super ĝi brilis arĝenta orelingo kun blua gemeto.

Mi ne povis tion plu elteni, miaj kruroj tremis. Jesuo Kristo, mi diras. La ĝendarmo serĉinta en la kuirejo ion surplanke, rektiĝis kaj rigardis min; li estis pala, kvazaŭ svenonta. Homo, mi dentklakis, ĉu vi militservis? Jes, raŭke respondis la ĝendarmo. Sed ĉi tio - ĉi tio estas io alia. Rigardu, li aldiris subite kaj montris la kurtenetojn sur la pordo; ili estis ĉifitaj kaj makulitaj; evidente la murdinto viŝis per ili siajn manojn. Sankta Dio, mi elspiris, mi ne scias, kio je ĝi estis tiom netolereble terura, ĉu ia imago pri la manoj gluecaj de sango, aŭ ĉu tio, ke ankaŭ la kurtenetoj, la puraj kurtenetoj iĝis viktimo de la krimo - Mi ne scias; sed tiumomente en la kuirejo ekpepis kanario kaj komencis longan triladon. Aŭskultu, tion mi ne plu eltenis; el la butikoj mi fuĝis pro teruro - mi opinias, ke mi estis pli pala ol la ĝendarmo.

Poste mi sidis ĉe ni en korto sur timono de garbveturilo kaj klopodis koncentri miajn pensojn. Ci idioto, mi diris al mi mem, ci timegulo, ĝi estas ja ordinara murdo! Ĉu ci ankoraŭ ne vidis sangon? Ĉu ci ne estis ĉirkaŭgluita per cia propra sango kiel porko per koto? Ĉu ci ne kriis je soldatoj, ke ili pli rapide fosu kavon por cent tridek kadavroj? Cent tridek kadavroj, unu apud la alia, tio jam estas rimarkinda vico, eĉ se oni ordigas ilin kiel ŝindojn - Laŭlonge de tiu vico ci promenis, fumis cigaredojn kaj alkriaĉis la soldataron: rapidu do, rapidu, por ke ĉi tio jam estu for!

druha papuĉe byla sezuta a bylo vidět punčochu na patě spravovanou - já vidím každý steh, a zdálo se mně to jaksi strašné, jako by i ta ubohá punčocha byla zavražděna. Jedna ruka se zarávala do podlahy; vypadala tak suše a bezmocně jako ptačí pařátek; ale nejhroznější byl drdůlek šedivých vlasů v týle zavražděné, protože byl tak pečlivě upleten a třpytil se mezi čůrky té sražené krve jako starý cín. Já měl pocit, že jsem neviděl nikdy nic žalostnějšího než ten potřísněný ženský cůpek. Jeden proužek krve zaschl za uchem; nad ním svítila stříbrná náušnička s modrým kamínkem.

Já už to nemohl vydržet, třásl se mně nohy. Ježíšikriste, povídám. Četník, který byl v kuchyňce a hledal něco na zemi, se vztyčil a díval se na mne; byl bledý, jako by chtěl omdlít. Člověče, jektal jsem, byl jste na vojně? Byl, chraptěl četník. Ale tohle - tohle je něco jiného. Koukněte se, dodal najednou a ukazoval na záclonky na dveřích; byly zmačkané a poskvrněné; patrně si o ně vrah utřel ruce. Kristepane, vydechl jsem; já nevím, co na tom bylo tak nesnesitelně hrozného, buď ta představa rukou lepkavých krví, nebo to, že i ty záclonky, ty čist'ouké záclonky se staly obětí zločinu - Já teda nevím; ale v tu chvíli začirikal v kuchyňce kanár a spustil dlouhý trylek. Poslyšte, tohle už jsem nevydržel; já z toho krámu utekl hrůzou - myslím, že jsem byl bledší než ten četník.

Pak jsem seděl u nás na dvoře na oji žebříňáku a hleděl jsem sebrat své myšlenky. Ty troubo, říkal jsem si, ty zbabělče, vždyť je to obyčejná vražda! Copak jsi ještě neviděl krev? Nebyl jsi zalepen svou vlastní krví jako prase blátem? Nekřičel jsi na své vojáky, aby kopali rychleji jámu pro sto třicet mrtvých? Sto třicet mrtvých vedle sebe, to už je slušná řada, i když je narovnáš jako šindele - Podle té řady jsi chodil, kouřil cigarety a řval na mančaft, tak dělejte, dělejte, ať už je to pryč!

Ĉu ci ne vidis tiom da mortintoj, tiom da mortintoj - Jes, tiel estas, mi diris al mi, mi vidis tiom da mortintoj, sed vidis eĉ ne unu Mortinton, mi ne genuis apud li por rigardi lian vizaĝon kaj tuŝi lian hararon.

Mortinto estas terure silenta; vi devas esti sola kun li... kaj eĉ ne spiri... por kompreni lin. Ĉiu unuopulo el la cent tridek penus diri al vi: Sinjor' leŭtenanto, oni mortigis min; rigardu miajn manojn, ja ili estas manoj de homo! - Sed ni ĉiuj fortunadis nin de la mortintoj; kiam ni devis fari militon, ni ne povis aŭskulti falintojn. Mia Dio, estus necese, ke ĉirkaŭ ĉiu falinto svarmu homoj kiel abeloj apud enflugejo - viroj, virinoj kaj infanoj, ke ili timtremante vidu almenaŭ parteton de li; almenaŭ la piedon en ŝuaĉo aŭ la makulitajn harojn - Tiam eble ĝi ne devus okazi; tiam ĝi eĉ ne povus okazi.

Kaj mi enterigis la panjon, ŝi aspektis tiel solene, pace kaj digne en la bela ĉerko. Stranga ŝi estis, sed ne terura. Sed ĉi tio, ĉi tio estas io alia ol morto; murdito ne estas morta; murdito akuzas, kvazaŭ li kriigus pro la plej granda kaj netolerebla doloro.

Ni scias tion, mi kaj la ĝendarmoj; mi scias, ke en la butiketo fantomis. Kaj en mia menso lumiĝis. Mi ne scias, eble ni ne havas animon; sed en ni enestas senmortaĵoj, kiel instinkto pri justeco. Mi estas neniel pli bona ol iu ajn alia viro; sed en mi estas io, kio ne apartenas nur al mi - antaŭsento de ia severa kaj grandioza ordo. Mi scias, ke ne ĝuste mi esprimiĝis; sed en tiu momento mi sciis, kio estas krimo kaj kio estas ofendo de Dio. Sciu, murdita homo estas kvazaŭ malhonorita kaj detruita templo."

„Nu," ekparolis sinjoro Dobeš, „ĉu oni arestis murdinton de la inaĉo?" „Jes," daŭrigis sinjoro Hanák. „Kaj mi mem vidis lin, kiam du tagojn poste ĝendarmoj kondukis lin el la butiketo, kie ili tiel dire enketis lin sur loko de l' ago. Mi vidis lin eble nur kvin sekundojn, sed denove kvazaŭ sub monstre grandiganta lupeo. Li estis junulo, sur la manoj li havis katenojn kaj iel strange rapidis, ke la ĝendarmoj apenaŭ sufiĉis lin sekvi.

Copak jsi nevidel tiol mrtvŭch, tiol mrtvŭch - Ano, to je to, řekl jsem si, videl jsem tiol mrtvŭch, ale nevidel jsem jednoho jedinŭho Mrtvŭho; neklekl jsem k nŭmu, abych se mu podŭval do tvŕe a dotkl se jeho vlasŭ.

Mrtvŭ je straŝnŭ tichŭ; musŭ ŝ bŭt s nŭm sŕm... a ani nedŭchat... abys mu rozumel. Jeden kařdŭ z tŕch sto třiceti by se namŕhal, aby ti řekl: Pane lajtnant, oni mŕ zabili; podŭvejte se na mŕ ruce, vřdyt' jsou to ruce ŕlovŕka! - Ale my vřichni jsme se odvraceli od tŕch mrtvŭch; kdŭř jsme mŕli dŕlat vŕlku, nemohli jsme poslouchat padlŕ. Proboha, ono by bylo třeba, aby se kolem kařdŕho padlŕho tlaĉili lidŕ jako vĕely u ŕesna - chlapi, řenskŕ i dŕti, aby ho trnouce vidŕli aspoň kousek; aspoň tu nohu v baganĉi nebo potřŭsnŕnŕ vlasŭ - Pak by to snad nemuselo bŭt; pak by to ani nemohlo bŭt.

A jŕ jsem pochoval maminku; vypadala tak slavnŕ, tak smŭrenŕ a sluŝnŕ v tŕ pŕknŕ rakvi. Divnŕ byla, ale nebyla straŝnŕ. Ale tohle, tohle je nŕco jinŕho neřli smrt; zavrařdŕnŭ nenŭ mrtvŭ; zavrařdŕnŭ řaluje, tak jako by řval nejvřŝŭ a nesnesitelnou bolestŭ.

My to vŭme, jŕ a ten ŕetnŭk; my vŭme, ře v tom krŕmku strařilo. A tak ve mnŕ zaĉalo svŭtat. Jŕ nevŭm, třeba nemŕme duři; ale jsou v nŕs vĕci nesmrtelnŕ, jako je pud po spravedlnosti. Nejsem o nic lepřŭ neř kterŭkoliv jinŭ chlap; ale je ve mnŕ nŕco, co nepatřŭ jenom mnŕ, - takovŕ tuřenŭ nŕjakŕho přŭsnŕho a velkŕho řadu. Jŕ vŭm, ře to řŭkŕm řpatnŕ; ale v tu chvŭli jsem vŕdel, co je to zloĉin a co je to urŕřka Boha. Abyste vŕdeli, zavrařdŕnŭ ŕlovŕk je jako pohanŕnŭ a zpusťořenŭ chrŕm."

„A co," ozval se pan Dobeř, „chytli toho, co tu babu zabil?" „Chytli," pokračoval pan Hanák. „A jŕ sŕm videl, kdŭř ho dva dny nato ŕetnŭci vedli z toho krŕmku, kde ho, jak se řŭkŕ, vyslŕchali na mŭstŕ ĉinu. Videl jsem ho snad jenom pŕt vteřin, ale bylo to zase jako pod nŕjakou nestvŭrnŕ zvŕřřujŭcŭ lupou. Byl to mladŭ chasnŭk, na rukou mŕl řetŭzky a tak divnŕ pospŭchal, ře mu ŕetnŭci stŕřŭ staĉili.

Lia nazo ŝvitis, kaj la malfermegitaj okuloj timeme palpebrumis - Videblis, ke li terure timas, kiel kuniklo dum vivisekcio. Neniam mi forgesos lian vizaĝon.

Post tiu renkontiĝo estis al mi turmente kaj naŭze. Nun oni juĝos lin, mi pensis, kaj post kelkmonataj formalajoj oni kondamnos lin al morto. Fine mi konsciis, ke fakte mi bedaŭras lin kaj preskaŭ mi kvietiĝus, se li iel eskapus antaŭ tio. Ne opiniu, ke lia vizaĝo estis simpatia, verdire male; sed mi vidis lin de tro proksime - mi vidis lin angore palpebrumi.

Mil diabloj, mi ne estas troa sentemulo, sed de proksime observata, li ne estis murdulo, simple li estis homo. Mi diras al vi, mi mem ne komprenas tion; mi ne scias, kion mi farus, se mi estus lia juĝanto; sed el ĉio ĉi mi sentis senfinan triston, kvazaŭ mi mem bezonus elaĉeton."

Nos se mi potil, a ty vypoulené oči tak poplašeně mžikaly - Bylo vidět, že má děsný strach, tak jako králik při vivisekci. Jakživ na ten obličej nezapomenu.

Mně bylo po tom setkání moc trapně a nanic. Teď ho budou soudit, myslel jsem, budou se s ním pár měsíců tahat, aby ho odsoudili na smrt. Nakonec jsem viděl, že mně ho je vlastně líto a že by se mi skoro ulevilo, kdyby z toho nějak vyvázl. Ne že by měl sympatický obličej, spíš naopak; ale viděl jsem ho příliš zblízka - viděl jsem ho úzkostí mžikat.

U čerchmanta, já nejsem žádná citlivka, ale tak zblízka, to nebyl vrah, to byl prostě člověk. Abych vám řekl, já tomu sám nerozumím; nevím, co bych udělal, kdybych byl jeho soudcem; ale bylo mně z toho všeho tak smutno, jako bych sám potřeboval vykoupení."